

Unesko-projekto Asociiĝintaj Lernejoj
Claude Gacond, 84-a radioprelego, 1964.07.08 & 11

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la Unesko-projekto **Asociiĝintaj Lernejoj**. Vi aŭdas Claude Gacond.

Hodiaŭ mi ĉefe parolos al edukistoj. Ekde 1954 la esperantistoj konstante emfazas pri sia kunlaboro kun Unesko. Sed fakte tiu kunlaboro estas tre pasiva. Ĝi esprimiĝas pli per vortoj, ol per videblaj agoj, escepte koncerne la **kampanjon Oriento-Okcidento**, kiu ebligas aperigi sub la etikedo Unesko tradukojn de literaturaj ĉefverkoj.

Se la kunlaborado esperantistaro-Unesko ne estas pli aktiva, tio ne estas la kulpo de UEA, sed de ia manko de imagpovo flanke de la esperantista edukistaro : instruistoj, grupestroj, gepatroj.

En sia lasta lerneja bulteno UEA instigas la lernejojn, kie esperanto estas instruata, al aliĝo al la Unesko-projekto **Asociiĝintaj Lernejoj**. Ni esperas, ke multnombraj estos la lernejoj, kiuj provos tiel rilati kun la Unesko-laboro.

Sed vi tuj diros : pri kio temas. Jen do mi legas al vi parton de la klarigoj donitaj en la lerneja bulteno numero dua.

*La Projekto **Asociiĝintaj Lernejoj** konsistas en tio, ke lernejoj de diversaj landoj libervole, kun aprobo de la edukaj aŭtoritatoj kaj, se necese, de la nacia Unesko-komisiono, decidus antaŭenigi ĉe la gelernantoj internacian kompreniĝon kaj kunlaboradon. La lernejoj elektas apartan studon de iu temo el inter la jenaj ĉefgrupoj : a) instruado pri Unuiĝintaj Nacioj ; b) homaj rajtoj ; c) aliaj landoj.*

La artikolo diras : Estas tute certe, ke bonegaj rezultoj povus esti atingitaj, tute speciale en la temaro « aliaj landoj », en la lernejoj, en kiuj esperanto estas instruata. Ĉar la projekto rilatas al gelernantoj de tre malsamaj aĝoj, ekde 11-jaraj ĝis 19-jaraj, oni facile povas, depende de la aĝo de la gelernantoj, utiligi esperanton por intensigi la studon ĉu de geografio aŭ historio, aŭ de ambaŭ, de iu lando, ĉu de ĝiaj literaturo aŭ kulturo. Se, ekzemple, jugoslavia lernejo decidus dediĉi sian studon al la sveda literaturo, tute ĝi trovas unuarangajn tradukojn el la sveda literaturo en esperanto. Same tiel, sveda lernejo trovas abundan literaturon de jugoslaviaj popoloj en esperanta traduko. La Konsulta Komisiono pri Lernejoj estas konvinkita, ke per iom da bona volo la rezultoj atingeblaj per esperanto sur tiu ĉi kampo povus konsiderinde superpasi la rezultojn, kiujn atingas la aliaj lernejoj nepovante utiligi la avantaĝojn de komuna lingvo. La Konsulta Komisiono pri Lernejoj, do, varme rekomendas al ĉiuj lernejoj, en kiuj esperanto estas instruata, esplori plej serioze la eblecojn kaj, se la cirkonstancoj permesas, tuj aliĝi al la Projekto.

Fraŭlino Gertrud Weigelt, UEA-fakdelegito en la urbo Berno kaj profesie biblioteko-asistantino, klarigis al ni, dum la jarkunveno de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu okazis en la montara lernejo Le Prédame la 13 kaj 14-ajn de junio, ke la esperantistaro ĝenerale ne profitas pri la servoj de ŝia biblioteko. Ŝi diris, ke eĉ se iu libro ne ekzistas en la biblioteko, legemulo tamen rajtas senpage mendi tiun libron pere de la interurba servo, kiu ligas ĉiujn bibliotekojn de la mondo. Tiam la bibliotekisto devas konsulti la libro-listojn de la aliaj bibliotekoj, ĝis kiam li trovos la menditan titolon, kaj la biblioteko, kiu posedas la libron devas ĝin sendi pere de la alia biblioteko al la mendanto. Kial la lernejoj, kiuj praktikus pere de esperanto la studon de geografio, historio, kulturo aŭ literaturo de alia lando, ne uzus tiun eblecon por la rikoltado de la necesaj libroj : libroj, kiuj certe estas foje delonge elĉerpitaj.

Ofte en la grupaj bibliotekoj libroj kuŝas dum jaroj sen esti pruntataj, tio ĉar la biblioteko ne plu funkcias, aŭ ĉar la grupanoj ne estas legemuloj. Se tiuj grupoj kontaktus sian urban bibliotekon por diskuti starigon de esperanta fako en la publika biblioteko, tiam ili mirus pri la interesiĝo de la biblioteka direktoro. Tion ĵus spertis la esperanta grupo en La Chaux-de-

Unesko-projekto Asociiĝintaj Lernejoj
Claude Gacond, 84-a radioprelego, 1964.07.08 & 11

Fonds. Ĝi posedis sufiĉe belan bibliotekon, sed ĉar inter ĝiaj membroj neniuj povis dediĉi la necesan tempon al la funkciigo de tiu biblioteko, neniuj grupanoj povis profiti pri ĝi. Nun la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds faros katalogon de ĉiuj tiuj esperantaj libroj, bindigos la nur broŝuritajn volumojn kaj pere de sia prunto-servo elpruntos ilin al la vizitantoj de la publika biblioteko. La esperantistoj, kiuj restas posedantoj de siaj libroj, el sia flanko promesis regule aĉeti novajn librojn, kiel ili jam faris ĝis nun. Se en ĉiuj urboj la esperanto-klubo agas same, en ĉiuj urbaj bibliotekoj devus troviĝi bibliotekisto, kiu devus koni esperanton. Ĉar por katalogi tiajn librojn, iu el la bibliotekistoj devus lerni nian lingvon. En La Chaux-de-Fonds tion faras la direktoro mem kaj alia biblioteka funkciulino.

Por reveni al la Unesko-Projekto mi diros ankoraŭ, ke la lernejo deziranta partopreni en la projekto **Asociiĝintaj Lernejoj**, devas sin turni al la Nacia Unesko-Komisiono de la propra lando, petante detalajn informojn pri la Projekto kaj pri la kondiĉoj de aliĝo.

Necesas ankoraŭ aldoni, ke la asociiĝintaj lernejoj kunvenas pere de siaj reprezentantoj de tempo al tempo en internaciaj konferencoj, kiujn subvencias Unesko. Prezentiĝas do taŭga okazo ankaŭ por ĉiuj lernejoj, en kiuj esperanto estas instruata kaj kiuj asociiĝos al la Projekto, partopreni en tiuj konferencoj. Do, pedagogoj, al la laboro. Kaj gepatroj, sciigu tiujn aferojn al la instruistoj de viaj infanoj. Kaj se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu skribi al mi pere de Radio-Svislando.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la Unesko-Projekto **Asociiĝintaj Lernejoj**.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-